

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

januaro/februaro/marto 1987



39a IFEF-Kongreso en Katowice 16a ĝis 22a de majo 1987



La Wawel-palaco en Krakovo, rezidejo de la polaj reĝoj dum la 14a, 15a kaj 16a jarcento. Nun ĝi enhavas la reĝan juvel-kolekton kaj ĉiuspecajn artvalorarojn: gobelenoj, pentraĵoj, antikvaj manuskriptoj, skulptaĵoj, mebloj, horloĝoj, ceramikajoj, kirasoj kaj armiloj, artobjektoj el proksima kaj ekstrema oriento.

Foto: Emil Rachwał

Pollando invitas vin

En la jaro 1887 la internacia lingvo Esperanto estas prezentita unuafoje al la publiko. Cent jarojn poste niaj polaj gekolegoj kore invitas al la 39a kongreso de la Internacia Fervojsista Esperanto-Federacio (IFEF), kiu okazos de la 16a ĝis la 22a de majo 1987 en Katowice.

El Pollando, la gepatra lando de d-ro Zamenhof, la lingvokreinto, Esperanto disvastiĝis tra preskaŭ la tuta mondo. La jubilea jaro certe stimulas ankaŭ membrojn kaj amikojn de la Germana Esperanta Fervojsista Asocio (GEFA) partopreni tiun IFEF-kongreson. El la IFEF-kongresoj dum la lastaj 39 jaroj tiu estas la unua en la kulture kaj historie riĉa Pollando. Multnombraj polaj gekolegoj antaŭe neniam povis kongresi kun ni pro konataj kaŭzoj. Nun ili ĝojas bonvenigi nin en sia lando. Do ni sekvu ilian koran inviton.

Katowice, la kongreslokon, oni nomas la metropolo de la pola karbo. La urbego de 320 000 loĝantoj situas en la t.n. supra silezia industriregiono, kie krom karbo estas elminigataj zinko, plumbo kaj ferfero. Sed ne timu, ke la urbo konsistas precipe el industriaj entreprenoj. Katowice disponas pri grandaj parkoj, alternejoj, sporta halego, agrablaj loĝkvartaloj kaj modernaj hoteloj, kiuj ofertas ĉian komforton al siaj gastoj.

La Kongresa programo estas multpromesa. Krom la solena malfermo, laborkunsidoj de delegitoj kaj komisionoj, fakaj prelegoj, okazos folkloraj vesperoj kaj ekskursoj. Unu duontaga ekskurso kondukos al Oświęcim, nuntempe centro de la ĥemia industrio. En tiu loko, kiu estas konata al germanoj pli bone sub la nomo Auschwitz, estas murditaj dum la okupacia tempo pli ol kvar milionoj da homoj el 28 nacioj. Sur la multe vizitata arealo troviĝas hodiaŭ muzeo kun kolektitaj dokumentoj pri tiu tempo.

Im Jubiläumsjahr nach Polen

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) lädt herzlich zur Teilnahme am 39. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten

Celo de la tuttaga ekskurso estos la iama metropolo Krakòw (Krakau), unu el la plej belaj urboj en Pollando.

Situanta ĉe la rivero Vistulo (Weichsel) ĝi estas plena da historie elstaraj konstruaĵoj. En la universitato, fondita jam antaŭ la eltrovo de Ameriko, studis la poste fama astronomo Kopernikus. La plej malnova urboparto estas la vasta foirplaco regata de la gotika Maria-preĝejo. De sur la turo tagmeze eksonas blvita melodio memore al tatara enfalo. En la preĝejo allogas de post 500 jaroj la mondfama altaro lignoskulptita fare de Veit Stoss el Nurenbergo. Pri tiu urbo memorigas ankaŭ la restintaj turoj kaj fortikaĵoj el la mezepoko. Ĝis la 16a jarcento Krakòw estis hansa urbo.

Super la urbo leviĝas la Wawel-kastelo, kie dum kvin jarcentoj la polaj reĝoj estas kronumitaj. 71 salonegoj de la kastelo enhavas altkvalitajn preciozaĵojn kaj gobelenojn el Flandrio. En la subtera kriptoj de la samloka katedralo, kiu estas ĉirkaŭata de 18 kapeloj, ripozas polaj reĝoj, famaj poetoj kaj naciaj herooj. Nekonate estas, ĉu la kongresanoj vizitos ankaŭ la proksiman salminejon el la 11a jarcento. Tie estas videblaj el salo verkitaj salonegoj, skulptaĵoj kaj eĉ preĝejo.

Ne preterlasu la unikan okazon festi kun viaj gekolegoj kaj amikoj la centjaran jubileon en la lulilo de Esperanto. Vi estas bonvena. W.B.

(IFEF) ein. Die Tagung wird vom 16. bis 22. Mai 1987 in der polnischen Stadt Kattowitz (Katowice) stattfinden. Da gleichzeitig das hundertjährige Bestehen der internationalen Sprache gefeiert wird, rechnen die Veranstalter mit besonders vielen Teilnehmern, auch aus der Bundesrepublik Deutschland.

Das Kongreßprogramm sieht eine Reihe offizieller Veranstaltungen vor, wie die feierliche Eröffnung, Arbeitssitzungen der Delegierten und Kommissionen, Fachvorträge, aber auch kulturelle Abende und touristische Veranstaltungen. So wird ein Ganztagesausflug in eine der schönsten Städte Polens führen, nach Krakau (Kraków) mit seinem mittelalterlichen Stadtkern und seiner einzigartigen Königsburg.

Die meisten Teilnehmer aus den westlichen Ländern werden den Weg über Leipzig — Breslau (Wrocław) wählen. Beispielsweise ist Kattowitz von Frankfurt aus in einer Nachtfahrt mit dem Liegewagen gut zu erreichen. Das Visum zum Besuch der Volksrepublik Polen wird zweckmäßigerweise vom Reisebüro vermittelt. Die Unterbringung in modernen Hotels ist gesichert. Anmeldevordrucke wurden mit BULTENO 5/1986 verteilt, sind jedoch auf Anforderung bei den Bezirksbeauftragten noch erhältlich. Nur der Kongreßbeitrag wird aufgrund einer besonderen Vereinbarung mit den Veranstaltern auf das Konto von GEFA überwiesen. Für alle anderen Vorauszahlungen gilt das im Anmeldevordruck aufgeführte Bankkonto in Polen. Die dort in US-Dollar angegebenen Beträge sind vor Überweisung in DM nach dem Tageskurs umzurechnen. Eine baldige Anmeldung wird empfohlen.

Gute Fahrt und auf Wiedersehen im Mai!
W. B.

Reisetips für Polen

Teilnehmer am diesjährigen IFEF-Kongreß benötigen ein Einreisevisum. Das Reiseunternehmen POLORBIS, Hohenzollernring 99 — 101, 5000 Köln 1, ☎ 0221-520025 vermittelt das Visum. Die Gebühren betragen zur Zeit 37 DM für das Visum, 20 DM für die Bearbeitung und 5 DM für den Postversand, zusammen also 62 DM. Der Antrag auf Erteilung des Visums, der beim Reisebüro erhältlich ist, sollte mit zwei Paßbildern frühestens zwei Monate, spätestens jedoch einen Monat vor Reiseantritt dem Unternehmen POLORBIS übersandt werden, d. h. zwischen Mitte März und Mitte April 1987.

Für jeden Aufenthaltstag in Polen ist ein Pflichtumtausch von 36 DM vorgeschrieben.

Beispiel: Ankunftstag 16. Mai, Abreisetag 23. Mai. Diese beiden Tage gelten als ein Tag = 36 DM, so daß insgesamt 7 Tage zu je 36 DM = 252 DM eingesetzt werden.

Der Gesamtbetrag für Visumerteilung und Pflichtumtausch wird von POLORBIS bei der Rücksendung des Passes als Nachnahme erhoben. Die Ein- und Ausfuhr polnischer Zahlungsmittel (Zloty) ist nicht gestattet.

Das Transitvisum durch die DDR gibt es im Zug bei der Einreise. Die Gebühr für die Hin- und Rückfahrt beträgt zur Zeit je 5 DM.

W. B.

La Polaj Ŝtataj Fervojoj (PKP)

Post la lasta mondmilito la dimensio de la Polaj Ŝtataj Fervojoj konsiderinde ŝanĝiĝis. El la reto de la Germana Regna Fervojo (DR) transiris la orienta parto al la PKP, dum la okcidenta parto de la PKP-reto estas transprenita per la Sovetaj ŝtataj Fervojoj (SZD). Por la internlanda kaj internacia trafiko kun 17 landoj PKP fariĝis la plej grava trafikilo konekse kun la evoluigo de la havenoj kaj poste de la ĉefosejoj.

Ĉirkaŭ 1 miliardo da pasaĝeroj vojaĝas en ĉiu jaro sur la polaj linioj; el ili estas 2 500 000 internaciaj pasaĝeroj. 400 milionoj da tunoj estas transportataj per PKP po jaro; el ili 44 milionoj koncernas la eksporton kaj 32 milionoj la importon. Bedaŭrinde tiuj indikoj ne estas aktualaj. Eble ili montras intertempe kreskantan tendencan. Ĉiukaze la konkurenco kun privataj aŭtomobiloj ne estas tiel granda kiel ĉe la fervojoj en okcidenta Eŭropo. Sed pligrandiĝis la kvanto de polaj kamionoj, kiuj transportas varojn. Cetere la SZD per sia novkonstruita pramlinio inter la Germana Demokrata Respubliko kaj la Sovetio supozeble konkurencos la internacian fervojan trafikon de PKP.

La reto de PKP estas parte elektrizita sur la ĉefaj linioj. Sur ia aliaj linioj trafikas dizelaj lokomotivoj. La kvanto de la vaporlokomotivoj regresas.

W. B.

Mitteilungen

Anmeldevordrucke für den 39. IFEF-Kongreß von 16. – 22. 5. 1987 in Katowice /Polen wurden mit Bulteno 5/86 verteilt. Mehrbedarf kann bei den Bba angefordert werden. Auf die Zahlungsweise für den Kongreß-Beitrag „Generalaj instrukcioj“ Ziff. 3 wird nochmals hingewiesen. Bitte die Anmeldefristen beachten.

Die Mitglieder des Arbeitsausschuß Esperanto und die Beauftragten treffen sich zur Arbeitssitzung am Samstag, 14. 3. 87 in Fulda.

Die Senioren treffen sich in Göttingen, Bez. Hannover Anfang September. Die Ankündigung erfolgt rechtzeitig durch unser BULTENO.

Die IFEF-Skiwoche 1988 wird in der Bundesrepublik Deutschland stattfinden.

In Ingolstadt wird die 31. JV vom 9. – 11. 10. 87 stattfinden. Die Einladung hierzu lesen Sie bitte in BULTENO 2/87.

Die 32. GEFA-JV wird der Bezirk Saarbrücken 1988 ausrichten.

IFEF-Abzeichen können zu einem günstigen Preis von DM 2,50 beim GEFA-Kassierer Karl Bernhard bestellt werden.

Aus den Bezirken

Hannover/Bremen

Die Zusammenkünfte der Gruppe Ffm Bestehen der Esperantogruppe Bremen wurden am 10. 12. 86 im festlichen Rahmen durchgeführt.

Am 15. 1. 87 berichtete Herr Grebe mit Lichtbildern über seine Reise durch China: „Entlang der Seidenstraße“.

Hamburg

Die Jahreshauptversammlung wurde am 8. 11. 86 im Bf Altona durchgeführt.

Frankfurt/Main

Die Zusammenkünfte der Gruppe Ffm finden künftig im Konferenzraum Nord des Hbf Ffm statt (1. Stock am Aufgang zur BSW-Kantine). Außer in den Monaten Mai und Oktober finden die Veranstaltungen 1 mal monatlich statt, z.B. am 17.2. d.J. Am 20.1. wurde der Reise-Bild-Bericht „Mit der Transsibirischen Bahn nach China“ angeboten.

Jahresversammlung der Tschechischen Eisenbahner-Esperantisten (Ĉeĥa Esperanto-Asocio).

Vom 10. bis 12. 10. 1986 fand in Prag und Kolin die 20. Jahresversammlung der „Ĉeĥa Fervojista Esperanto-sekcio“ statt.

Als Delegierter von GEFA nahm Egon Kiefer teil.

Die ankommenden Teilnehmer wurden in Esperanto in Prag Hbf begrüßt. Außer Kolleginnen und Kollegen der ĈSD waren Delegationen aus Bulgarien, der DDR, Polen, Österreich und der Schweiz anwesend.



Jahresversammlung der tschechischen Eisenbahner-Esperantisten. Egon Kiefer (Bba Ffm) begrüßt die Teilnehmer.

Das Programm sah u.a. die Besichtigung der Eisenbahn-Versuchsanstalt in Cerhenice vor, die Konferenz und einen Ausflug zur mittelalterlichen Stadt Kutna Hora sowie als Abschluß den Besuch historischer Stätten und eine Stadtführung in Prag.

Aus fachlicher Sicht dürfte es interessant sein, hier näher auf den sog. Eisenbahn-Versuchsring in Cerhenice einzugehen: Der „Eisenbahnversuchsring des Instituts für Eisenbahnforschungen, ŽZD VÜŽ“ ist eine Experimentalbasis, die vom Gesichtspunkt ihrer Inbetriebnahme im Jahre 1963 wohl die erste derartige Einrichtung für Eisenbahnschienenfahrzeuge der Normalspur ist. Im wesentlichen besteht der „Versuchsring“ aus zwei Versuchsstrecken, einem äußeren Streckenring mit ca. 20 km Länge, einem inneren Ring mit ca. 4 km, die in die Landschaft mit Dörfern und Wäldern eingebettet sind.

Die Versuchsergebnisse bieten den Eisenbahnverwaltungen die Möglichkeit, richtige Entscheidungen hinsichtlich der Investitionsvorhaben zu treffen.

So hat dem Vernehmen nach auch die DB hier Versuche im Rahmen der Neubausrecken vornehmen lassen.

Seitens der tschechischen Kollegen plant man hier eine Fachkonferenz, bei der u.a. auch Esperanto als Arbeitssprache vorgesehen ist.

Die äußere Versuchsstrecke konnten wir mit einem dampfbetriebenen Nostalgiezug genießen.

Die sehr aufschlußreiche Führung durch Kutna Hora, das einmal städtebaulich als Konkurrenz zu Prag konzipiert war, wurde abgerundet durch einen fröhlichen Ausklang in einer historischen Gaststätte. Hier trug Egon Kiefer mit humorvollen Einlagen und Gesang bei.

Mit herzlichem Dank an die tschechischen Kolleginnen und Kollegen für die gastliche Aufnahme traten wir die Heimreise an mit der Hoffnung „ĝis revido“ in Katowice beim IFEF-Kongreß 1987 oder sonst in „Esperantujo“.

Seminario por kursgvidantoj

GEFA intencas okazigi tian seminarion. Aŭ eble pli klare ni nomu ĝin „Kurso por kursgvidantoj kaj tiuj, kiuj deziras fariĝi kursgvidanto“. Ĝi antaŭvideble okazos en iu BSW-hejmo en novembro 87 je tre modera prezo (inter 20 kaj 25 DM potage por plena pensio), ĉar BSW-ĉefestraro jam signalis sian helpon. Ni ankaŭ jam povis interesigi internacie renomitan intruiston, kiu pretas gvidi la seminarion tiel ke ĉiu partoprenanto povos kalkuli pri bona rezulto. Ankaŭ rajtos ĉeesti du, tri eksterlandaj gastoj.

Por povĵi prepari kaj fiksi la kondiĉojn, ni petas ĉiujn interesulojn kiel eble plej baldaŭ, plej malfrue ĝis 6a de marto, anonci sian intereson al la GEFA-prezidanto (adreson v. lastan paĝon). La nombro de partoprenantoj estos limigata je 15 personoj. Ĉiu aktiva fervojisto bezonos tri aŭ kvar feriajn tagojn, kio dependos de la tempo, kiam ni ricevos lokojn en la hejmo. Anoncojn ni konsideros laŭ la vico de ilia alveno.

Tiu kurso estos unika ebleco por metode lerni la instruadon de Esperanto, ĉar bona volo sole ne sufiĉas por instrui. Kaj

ni montru al BSW, ke inter niaj membroj troviĝas sufiĉe da seriozaj kaj saĝaj esperantistoj, kiuj volonte utiligas al si tian maloftan okazon, plibonigi siajn lingvajn sciojn.

prezidanto

Germana Esperanto-Asocio informas:

Novspeca nacia Esperanto-Kongreso en la Jubilea Jaro
Germana Esperanto-Asocio invitas al la 65a Germana Esperanto-Kongreso de la 17a de aprilo ĝis la 24a de aprilo 1987 al la histori-riĉa urbc Rastatt, sude de Karlsruhe, inter Rejno kaj Nigra Arbaro.

Aliĝiloj / informiloj haveblas ĉe la Loka Kongresa Komitato por la 65a Germana Esperanto-Kongreso, s-ro Horst Fischer, Steinmauerner Str. 22, D-7550 Rastatt, tel. 07222/21515.

Antaŭpagojn oni povas sendi al la trezoristo de la Kongreso s-ro Michael Herrmann, Ostlandstr. 6, D-7231 Hardt, konto 0438479901 banko: Dresdner Bank Villingen-Schwenningen bankkodo: 692 800 35

Billige Esperanto-Schallplatten

In den Jahren 1958/59 hat die damalige Arbeitsgemeinschaft Esperanto-Filmo-Germanujo mehrere Schallplatten herausgebracht, von denen noch ein begrenzter Vorrat vorhanden ist. Es handelt sich um zwei 17cm-Platten der Firma Philips mit den Nummern 002 und 004.

Auf 002 sind zu hören Tiritomba, Vizitante Regensburgon, Ho Normandi', Adiaŭo (havaja), Noktiĝas en erikejo (deutsches Volkslied), es singt der Chor der Esperanto-Societo Hamburg. Auf 004 sind zu hören Tik-e-tik-e-tok, Valsrevado (O.Strauß), Vilja-kanto (Lehar) und Sari Marejs, es singt der Chor von EFG.

Preis pro Platte 5.— DM einschl. Porto. Bestellungen bitte an Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8, 6700 Ludwigshafen (Rh) oder als EDS an BOS Bernhard, Bf 680 Mannheim Rbf. Betrag vorher überweisen auf Konto 953 729 Sparda-Bank Frankfurt, Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten und auf Überweisungsträger Zweck angeben.

Von den Platten 001 und 003 kann bei Bedarf in Einzelfällen eine Kassette hergestellt werden. Bestellungen hierfür bitte schriftlich an J. Gießner, An der Nicolaischule 3, 3420 Herzberg am Harz. Preis pro Kassette 10 DM einschl. Porto.

GEFA

Erneute Anerkennung auf internationaler Ebene

Der Esperanto-Weltbund hat beim Europarat einen beratenden Status erhalten. Dies geht aus einer Erklärung hervor, die das Generalsekretariat des Europarates vor kurzem in Straßburg veröffentlichte.

Dieser Status ermöglicht es dem Weltverband der Esperantisten, der Mitglieder aus über 100 Ländern vertritt, an den Debatten über die Politik des Rates teilzunehmen und seine Vorstellungen zur Sprachpolitik stärker als bisher zu Gehör zu bringen.

Der Europarat ist damit die zweite bedeutende internationale Organisation, die der Zielsetzung des Esperanto-Weltbundes, eine gemeinsame zweite Sprache für alle Menschen einzuführen, durch die Verleihung eines beratenden Status Anerkennung zollt.

Bereits seit 1954 haben die Esperantisten bei der Unesco einen Beraterstatus als nichtstaatliche Organisation. Esperanto aktuell 7/86

Interesa enketo

Okaze de la 100jara jubileo de Esperanto la ĉefa gazeto de jugoslavijaj fervojistoj, kiu semajne aperas en Beograd sub la titolo „ŽELEZNIČKE NOVINE“ (Fervoja Gazeto), planas en la jaro 1987 realigi pere de Esperanto internacian enketon pri la vivo de fervojistoj en la mondo. En tiu rubriko oni aperigos tekstojn de fervojistoj esperantistoj el diversaj landoj pri ilia vivo kaj laboro. Al ĉiuj kontribuantoj oni poste sendos du ekzemplerojn de la gazeto kun aperigita teksto (kaj fotoj) kaj informan materialon pri Jugoslavijaj Fervojoj (prospektojn, insignojn. k. s.) kiel modestan rekompencan.

Redakcio de la gazeto „Železničke novine“ kaj JAFE invitas ĉiujn skribemajn fervojistojn esperantistojn partopreni en tiu interesa agado. Se la kolektita materialo estos sufiĉe abunda kaj kvalita oni preparos el tiuj kontribuajtoj apartan broŝureton.

Materialon bonvolu sendi (ne forgesu fotojn kaj koncizan propran biografion) al jena adreso (per deĵora fervoja poŝto):

Zajednica Jugoslovenskih Želenznica
— Za JAFE (G. Sredić) —
Beograd, Nemanjina 6 (poŝtako 563)

La redakcio kaj JAFE anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.

Nekrologo

Laŭ informo de la distrikto Essen jam en majo pasintjare ni perdis nian multjaran membron

Albert Rehwinkel (88)

Jam komence de la tridekaj jaroj li estis aktiva esperantisto. Ĝis 1985 li vivis sola en loĝejo en Dortmund, ek de tiu jaro en maljunulara hejmo en sia hejmurbo.

GEFA kondolencas al la postlasitaj familianoj.

El la fervoja mondo

Kubo:

Laŭ la evoluo de la moderniga programo por la Kubaj fervojoj oni ĝis la jaro 2000 volas renovigi ĉirkaŭ 3500 km da normal-ŝpuraj fervojlinioj. La modernigaj laboroj sur la 860 kilometrojn longa unutraka ĉeflinio Havano – Santiago de Cuba staras jam antaŭ la finiĝo. Estonte la ĝisnuna maksimuma rapideco de 85 km/h sur tiu grava interligo de oriento al okcidento povas esti plialtigata al 140 km/h en persontrafiko kaj 100 km/h en vartrafiko.

Aŭstrio / Francio:

Kunlabore kun la aŭstra kamion-survagona trafikasocio ÖKOMBI kaj la franca NOVATRANS instaliĝis kamion-survagona trafikunigo inter la aŭstra kaj franca ĉefurboj. La distanco de 1300 km estas trapasata en 40 horoj. En la direkto Vieno – Parizo la veturiloj, ekspeditaj ĝis la dekkvara kaj duono estas ja dispono ĉe la celstacio en postmorgaŭa tago ekde la sesa, en la direkto Parizo – Vieno la veturiloj, ekspeditaj je la dudeka oni povas akcepti en postmorgaŭo je la dekdua. La finkonstruo de la kombinita trafiko inter Francio kaj Aŭstrio estas kaŭzita per la konstante kreskanta transitrafiko en Aŭstrio kaj la deziro de la federaciaj oficoj centralizi tiun trafikon dank' al la tekniko de la survagona kamiontransporto.

Hispanio/Francio:

Ek de la jarkomenco komputero estas je dispono al la hispana kaj franca funkcia

personaro en Irun kaj Hendaye por tradukado de la francaj kaj hispanaj telegramoj, kiuj estas interŝanĝataj por la veturigo de la trajnoj kaj la manovraj laboroj ambaŭflanke de la limo.

Hungario:

La elektrizado sur la linio Budapeŝt – Pécs (Sudhungario) jam antaŭ nelonge finiĝis. Kadre de ilia elektrizadprogramo la MÁV komencis pluajn laborojn sur la linio, kondukanta de la hungara ĉefurbo al Székesfehérvár kaj Szabadbattyán.

F. Busse

Proverboj

Sukceson havi signifas renkonti la ĝustajn personojn en la ĝusta tempo.

La plej findinda kaj agrabla vojaĝovojo al la pasinteco estas la muziko.

Kiu starigas sin al la publiko, povas nek atendi nek postuli indulgon.

Prefere neniu sukceso ol neniu decido.

La homo estas libera nur tiam, kiam li estas tute forgesita de la publiko.

Oni ne povas aserti, ke la civilizacio ne progresas; en ĉiu milito oni mortigas per nova maniero.

Ĉu vi scias, ke el ĉiuj eŭropaj urboj Hamburgo havas la plej multajn pontojn, nome 2195.

W. B.

Arm Kräutlein

Ein Sauerampfer auf dem Damm
stand zwischen Bahngeleisen,
machte vor jedem D-Zug stramm,
sah viele Menschen reisen.

Und stand verstaubt und schluckte Qualm,
schwindsüchtig und verloren,
ein armes Kraut, ein schwacher Halm
mit Augen, Herz und Ohren.

Sah Züge schwinden, Züge nahn,
der arme Sauerampfer,
sah immer nur die Eisenbahn,
sah niemals einen Dampfer.

Joachim Ringelnatz (1883 – 1934)

Mizera herbeto

Okzalo sola apud la
fervoja trako sidis,
kaj salutante multe da
entrajnaj homoj vidis.

Kaj polv-kovrite glutis ĝi
la fumon sur la digo;
ne estis ĝi ja sen konsci',
la febla, ftiza tigo.

Aliĝi kaj foriĝi nur
la trajnojn vidis ĉiam,
vapor-ŝipon vidis sur
la ocean' neniam.

Trad. M. Retzlaff

**Estraro kaj komisiitoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio
en la Socia Organizo de Germana Federacia Fervojo
Stato: januaro 1987**

Estraro

Prezidanto: BAR a. D. Giessner,
An der Nicolai-Schule 3, 3420 Herzberg
am Harz, tel. 0 55 21 / 45 86; EDS an
Bf 342 Herzberg (Harz)

Vicprezidanto/Redaktoro:

BAR a. D. Grass, Sachsenstraße 7,
8620 Lichtenfels, tel. 0 95 71 / 64 68
EDS: Ga 862 Lichtenfels, Abhofach

Sekretario: BHS Riehn, Bm 680 Mannheim,
Basa 953/899/1236
Privata adreso: Richard Dehmel-Str. 3,
8700 Ludwigshafen/Rhein,
tel. 06 21 / 58 24 43

Distrikta komisiitoj:

Essen: BBI Rolf Terjung Bf 433 Mülheim/
Ruhr, Basa 944/818/366.
Privata adreso: Finkenschlag 68,
4100 Duisburg 26, tel. 02 03 / 724095

Frankfurt/Main: BAR Kiefer, BSA 600
Frankfurt/Main, AA 341, Basa 955/5656
Privata adreso: Erthalstr. 6, 8770 Lohr/Main,
tel. 09352/6707

Hamburg: BHS Böhnke, Bf 240 Lübeck Hbf.
Basa 947/862/374

Hannover: BBI a. D. Heimlich,
Bf 304 Soltau/H., tel. 0 51 91 / 52 13

Karlsruhe: BOS Bernhard, Bf 680 Mann-
heim Rbf, Basa 953/899/2332

Köln: BAmtm a. D. E. Herlitz,
Prof. Neu-Allee 32, 5300 Bonn 3,
EDS: Fka 530 Bonn Hbf

München: BHS Lenz,
800 GV München Nord, Basa 962/1528

Nürnberg: TBOAR Röder, BD 850 Nürnberg
Th 20, Basa 966/5671

Saarbrücken: BBI a. D. Haupenthal,
BD 660 Saarbrücken, V 26
Privat: Brennender-Berg-Str. 28
6603 Sulzbach/Saar, tel. 0 68 97 / 38 56

Stuttgart: TBOAR Krüger,
BD 700 Stuttgart, MW 0013; Basa 952/3125

Specialaj komisiitoj

Kasisto: BOS Bernhard, Bf 680 Mannheim
Rbf, Basa 953/899/2332

Fakterminaro: LBI a. D. Hartig,
Bezk. 280 Bremen
privata adreso: Kasseler Str. 76,
2800 Bremen 1, tel. 04 21 / 35 33 39

BOAR Ritterspach, ZA 650 Mainz,
Mk 1131, Basa 954/5533;

Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:

BAR Lautenbach Bktr der Ra, BD Ffm,
640 Fulda; Basa: 822/406
Privata adreso: Abtstor 21, 6400 Fulda,
tel. 06 61 / 7 76 27

Bulteno-dissendo: BOS a. D. Heinz Schindler,
Max Klein-Straße 21, 5830 Schwelm,
tel. 0 23 36/1 56 54, EDS: Fka 583 Schwelm

Emerituloj:

BHS-in a. D. Elfriede Kruse, Wiener Str. 121
6000 Frankfurt/Main 70, telef. 069/65 73 65

Arkivo: BHS Riehn, Bm 680 Mannheim,
Basa 953/899/1236

Biblioteko kaj IFEF-kontaktadreso:

BAmtm a. D. Otto Rösemann, Ringstr. 14 D,
3067 Lindhorst, tel. 05725/7992,
EDS: Betr.St. Bf 306 Stadthagen

Gazet-kolektejo kaj -forluado: BAR Kiefer,
BSA 600 Frankfurt/Main, AA 341,
Basa 955/5656

Specialaj taskoj:

BOAR a. D. Barnickel, Betr.St. Fahrkarten-
kasse 600 Frankfurt/Main Süd
Privata adreso: Tiroler Str. 12 b
6000 Frankfurt/Main 70, tel. 069 632372

— * * * —

Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Jen ni komunikas la aktualan adresaron
de la GEFA-estraro kaj de la komisiitoj.
Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale
ŝanĝi la preparitajn adresojn por garanti
la akuratan akcepton.

— * * * —

Redaktfino por n-ro 2/87 estas la 25.3.1987.